

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



61a jaro n° 5  
septembro - oktobro 1968

61a jaro n° 1  
januaro - februaro - marto 1969




# Sonorilo

DUMONATA BULTENO DE B.E.F.

REDAKCIO : Jaumotte Maurice  
Roose Fernand, Sint-Klaradreef 59, Brugge Tel. (050) 319.81  
Maertens Grégoire  
Poupeye Charles

ADMINISTRADO : Terryn Juliette, Raapstraat 72, Gent



ASOCIO SEN PROFITA CELO

SIDEJO & PREZIDANTEJO

Debruyllaan 44, Wilrijk Tel. (03) 274525

HONORA PREZIDANTO

HONORA VICPREZIDANTO

Dro Kempeneers Paul

Sielens Henri

GENERALA PREZIDANTO

Jaumotte Maurice

PREZIDANTOJ

Debrouwere Gerard, Magdalenastraat 29 Kortrijk  
Dro Denoël Pol, 20 rue V. Raskin Liège

VICPREZIDANTO

Roose Fernand

GENERALA SEKRETARIO

Verstraeten Jules, Sint Bernardse Steenweg 1078 Hoboken

SEKRETARIO POR LA NEDERLANDLINGVA REGIONO

Maertens Grégoire, Prins Leopoldstr. 51, St.-Kruis  
Tel. (050) 349 35

SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO

Paulus Raymond, 73, rue de Montignies, Charleroi

KASISTO

Balleux René, Oude Donklaan 83 Deurne

POSTKONTO DE B.E.F. : 1634 34 OUDE DONKLAAN 83 DEURNE


ĈEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Fr. Schellekens, Frans Hensstraat, 44, Antwerpen 2  
P.K. 9051 25

7-a markola kongreso

51-a kongreso de B.E.F.

BRUGO 3/4.5.1969



ADRESO POR KORESPONDADO

G. MAERTENS Prins Leopoldstraat 52 Sint-Kruis

ADRESO POR ALIGILOJ & PAGADO

POUPEYE Yvonne, Philips de Goedelaan 17 Brugge

LOKA KONGRESA KOMITATO

**Prezidanto** : S-ro J. Doyelle, 9, rue de Dunkerque, Bourbourg, Francujo  
**Vicprezidantoj**

S-ro Ch. Poupeye  
S-ro F. Roose

**Sekretario** S-ro G. Maertens

**Kasistino** F-ino Y. Poupeye

**Delegitino de la britoj**

S-ino RAZZELL Norah  
8, the Drove  
BRIGHTON 5 - Anglujo

**Delegito de la junularsekcio** :

S-ro P. Blondelle

**Gemembroj** : F-ino Dekoninck S. - S-ro Demeulenaere D. - S-ro Dumarey A. - S-ro Iserentant R. - S-ro Marmenout A. - S-ro Martens R. - F-ino Van Parys Is. - S-ino Verbeke - F-ino Willems M.

**Kotizo** : 100 B.F. - 10 F.F. - 16 ŝil.

Por familianoj kaj gejunuloj malpli ol 25-jaroj :

50 B.F. - 5 F.F. - 8 ŝil.

Bonvolu pagi al GENERALE BANKMAATSCHAPPIJ, Brugge per poŝtĉekkonto 6475 aŭ per bankĝiro kun la mencio :

konto 390.114/2 MARKOLA ESPERANTO - KONGRESO

La familianoj kiuj jam pagis 100 BF bonvolu ne subtrahi 50 BF. de kromaj pagoj : ili ricevos tiun sumon okaze de la transdono de la kongresdokumentoj.

**Fervoja rabato** :

Ĉiu aliĝinto ricevos ĝustatempe antaŭ la kongreso specialan rajtigilon, kiu ebligos ricevi 25% -an rabaton por ir-revena veturo al la kongreso, valida nur sur la belgaj fervojoj.

**Logado** : Vidu la enmetitan aliĝilon.







## PROGRAMO

<b>Sabato</b> 3.5.69	14-a horo :	malfermo de la akceptejo en Hotelo Du Sablon Noordzandstraat 21
	16-a horo :	komitatkunveno vizito al la urbo
	20-a horo :	oficiala kunveno : Malfermo Teatroludoj - muziko Balo
<b>Dimanĉo</b> 4.5.69	9-a horo :	Sta Meso por katolikoj
	10-a horo :	markola kunveno
	11.30-a :	akcepto fare de Westtoerisme
	13-a horo :	bankedo en HOTELO Du Sablon
	15-a horo :	eventuale - se la komunumestraro kosentas, inaŭguro de la Esperanto-strato en St.-Kruis diversaj vizitoj
	17-a horo :	ferma kunveno (kun manĝeto)
<b>Lundo</b> 5.5.69	10-a horo :	procesio de la sankta sango
	14-a horo :	ebleco por rezervigi lokojn ebleco por komune manĝi

## I-a LISTO DE KONGRESANOJ

- 1 - S-ro JAUMOTTE M., De Bruynlaan 44 Wilrijk
- 2 - S-ino JAUMOTTE
- 3 - S-ro DEBROUWERE G., Magdalenastraat 29 Kortrijk
- 4 - S-ino DEBROUWERE
- 5 - S-ro DENOËL P., 20 rue Victor Raskin Liège
- 6 - S-ino DENOËL



- 7 - S-ro JACOBS R., 94 rue Gén. Eenens Bruselo 3
- 8 - S-ino JACOBS
- 9 - S-ro G. C. FIGHIERA, 13 rue de la Reinette Bruselo 1
- 10 - S-ino FIGHIERA
- 11 - S-ro H. CASTEL, Square du Centenaire 29 Ganshoren
- 12 - S-ino CASTEL
- 13 - F-ino S. OPSOMER, 24 Marnixlaan 9 et. Bruselo 5
- 14 - S-ro H. BOFFEJON, Zegersdreef 95 Brasschaat
- 15 - S-ino BOFFEJON
- 16 - F-ino P. DE COCK, Val. de Saedeleerstr. 19 Aalst
- 17 - S-ino J. DE HONDT, Zamenhofstr., 7 Antwerpen
- 18 - F-ino BL. GEERS, Grote Beerstr. 6 Antwerpen
- 19 - F-ino M. TH. HENQUINEZ, St.-Maartensdal 1171 Leuven
- 20 - S-ro J. LERNOUT, Heilig Kruisstr. 11 Mortsel
- 21 - S-ino A. MEURRENS, Naamsestr. 78 Leuven
- 22 - F-ino A. ORSOLINI, 6 rue Paul Pastur, Charleroi
- 23 - S-ro PAESMANS, Koepoortstr. 64 Antwerpen
- 24 - F-ino PEETERS, Onderwijsstr. 68 Antwerpen
- 25 - S-ro POUPEYE CH., Philips de Goedelaan 17 bis  
Residentie "Regent Palace" Brugge
- 26 - S-ino POUPEYE
- 27 - F-ino POUPEYE YVONNE
- 28 - F-ino M. G. SAELMAEKERS, Vital Decosterstraat 45 Leuven
- 29 - S-ro FR. SCHELLEKENS, Frans Hensstr. 44 Antwerpen
- 30 - F-ino TERRY, Raapstr. 72 Gent
- 31 - S-ro M. VANDERLINDEN, Dorpstr. 44 Astene Deinze
- 32 - S-ro J.B.R. VAN HUMBEECK, Dambruggestr. 296 Antwerpen
- 33 - S-ino BL. VERMUYTEN, Waterhoenlaan 9 Antwerpen 10
- 34 - S-ro J. VERSTRAETEN, St.-Bernardsesteenweg 1078 Hoboken
- 35 - S-ino STAES, Av. de la Liberté 11 Bruselo 8
- 36 - S-ino E. ERNST, Av. du Sacré-Cœur 89 Bruselo 9
- 37 - S-ino R. LECAT, Lange Lezannastr. 103/31 Antwerpen
- 38 - S-ino S. DEWERHEM-DEWACHTER, 382 Av. de la Basilique Bruselo 8
- 39 - S-ino L. BERNAERTS-TOUSSAINT, Kolenielaan Antwerpen 2
- 40 - S-ro SIELENS H. Falconrui 21 Antwerpen
- 41 - S-ro P. DE SMEDT, Hemelstr. 67 St.-Gilles-bij-Dendermonde
- 42 - S-ro BALLEUX R. Oude Donklaan 83 Deurne Antwerpen
- 43 - S-ino BALLEUX
- 44 - F-ino WILLEMS M., Veldmaarschalk Fochstr. 55 Brugge
- 45 - S-ro R. ISERENTANT, Kerklaan 61 Brugge
- 46 - F-ino I. VAN PARYS, Gistelsteenweg 338 St.-Andries-Brugge
- 47 - S-ro P. SMETS, Marinistr. 13 Borgerhout
- 48 - S-ro A. BREDA, 32 rue Delstienne Marcinelle
- 49 - S-ro MARTENS, R. Bapaumestraat 5 Brugge
- 50 - S-ino RAZELL NORAH, 8 the Drove, Brighton 5 Anglujo
- 51 - S-ro DOYELLE J., 9 rue de Dunkerque, Bourbourg, Francujo
- 52 - S-ino DOYELLE
- 53 - S-ro LEGROS, Francujo
- 54 - S-ino LEGROS, Francujo
- 55 - S-ro ROOSE F., Sinte-Klaradreef 59 Brugge
- 56 - S-ino ROOSE-DEKERSGIETER
- 57 - S-ro MAERTENS G., Prins Leopoldstraat 51 Sint-Kruis
- 58 - S-ino MAERTENS-MALLET G.
- 59 - S-ro P. BLONDELLE, L. Debruynestraat 67 Sint-Kruis
- 60 - F-ino S. DEKONINCK, Ontvangerstraat 2 Brugge
- 61 - S-ro D. DE MEULENAERE, Boogschutterslaan Sint-Kruis
- 62 - S-ro A. DUMAREY, Blekerijstr. 32 Assebroek
- 63 - S-ino VERBEKE-VANDENBERGHE, Sint-Jakobstr. 42 Brugge
- 64 - S-ro A. MARMENOUT, Koninginnelaan 98 Blankenberge
- 65 - S-ro DIRK MAERTENS, Pr. Leopoldstr. 51 Sint-Kruis
- 66 - S-ro JOHAN MAERTENS
- 67 - S-ro GUIDO MAERTENS



# "Esperanto kiel lingvo por diplomatoj"

Parolado de Ralph Harry  
(Ambasadoro de Australio)

daŭrigo de la artikolo en Sonorilo nr 3/68

## La Nuna Situacio

Kiam oni demandas al mi ĉu la internacia lingvo estas sufiĉe preciza, sufiĉe nuancorika, por funkcii kiel diplomacia lingvo mi ne hezitas. Mi citas faktojn:

(a) ekzistas bonegaj kaj tute precizaj tradukoj de kelkaj traktatoj kaj deklaraĵoj kaj rezolucioj - eĉ oficialaj raportoj pri agado en Unuiĝintaj Nacioj.

(b) estas diplomatoj kiuj konstante uzas la lingvon. Mi konversaciis kaj korespondas kun kelkaj ambasadoroj, ĝeneralaj konsuloj kaj konsilantoj. Mi tute ne estas unika birdo!

(c) estas Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj, kun ĝia propra organo "Internacia Jura Revuo", kiu kunvenas ĉiujare por diskuti temojn rilate internacian juron. Scienca Revuo, Norda Prismo, kaj Heroldo de Esperanto ankaŭ enhavas de tempo al tempo artikolojn pri diplomaciaj aferoj kaj internacia juro.

Dum konferenco de Unuiĝintaj Nacioj kiun mi ĉeestis en Vieno antaŭ kelkaj tagoj oni diskutis la problemon de interpretado de multlingvaj traktatoj. Kiel kortumo povas scii la signifon de klaŭzo de traktato kiam oni havas ekzemple anglan, ĉinan, francan, hispanan kaj rusan tekstojn el kiu ĉiu estas egale aŭtentika? Oni menciis, ke en la kazo de traktato inter Etiopio kaj Japanujo, oni faris tekston en la franca lingvo kiel kontrola teksto, se estus dubo pri la signifo de la etiopiaj aŭ japanaj vortoj. La itala delegito bedaŭris, ke la latina lingvo ne povas funkcii kiel neutrala lingvo en tiaj cirkonstancoj. Mi mem esprimis preferon por la moderna neutrala lingvo, Esperanto. Kaj por pruvi la taŭgecon de Esperanto mi faris tradukon de la projekto de Konvencio, kiun la Konferenco diskutis.

Mi prezentis kopion al ĉiu delegito kaj nun prezentas ekzempleron al vi, S-ro Prezidanto.

## Taskoj Plenumendaj:

Do ni faris progreson dum la pasintaj 60 jaroj. Tamen restas gravaj taskoj plenumendaj antaŭ ol ni rajtos proponi al registaroj ke ili akceptu Esperanton kiel oficialan lingvon por diplomacia intertraktado:

(a) Ni devas solvi la problemon de geografiaj nomoj. Estas tre embarase kiam oni faras proponon al registaro ke la gazetaro de nia movado uzas diversajn formojn de la nomo de la koncerna lando! Mi esperas, ke sur la bazo de la nova mondmapo kaj la rekomendoj de la komisiono pri geografiaj nomoj ni sukcesos normigi la uzadon de landnomoj en Esperanto. Almenaŭ mi esperas, ke tio estos la komenco de la solvo. Tiam ni povos prezenti Esperanton kiel helpilon por la normigo de internaciaj mapoj, problemo pri kiu Unuiĝintaj Nacioj laboras.

(b) Ni bezonas pli da modeloj, pli da tekstoj de la fundamentaj dokumentoj de la diplomatio - la konstitucioj de Unuiĝintaj Nacioj, la Internacia Kortumo, la Specialigitaj Organizadoj, kaj de la gravaj traktatoj. Mi mem kunlaboras kun Profesoro Lapenna kaj S-ro Svane, dana diplomato, por prepari definitivan tekston de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj. Estas aliaj projektoj - sed ni bezonas la subtenon kaj helpon de la movado por atingi nian celon.

(c) Oni bezonas ankaŭ fakan terminaron de la diplomatio kaj internacia juro. Tio ankaŭ estas preparata.

(d) Devas esti pli da Esperantistoj-diplomatoj. Tio, mi konfesas estas ĉefe la tasko de ni la diplomatoj! Sed se vi konas belgan diplomaton

kiu eble lernus Esperanton kaj vi bezonas atestanton, mi estas preta fari mian devon!

## Konkludo

Sinjoro Prezidanto, mi estas Esperantisto - mi diras tion spite de la poemo de Baghy - alivorte mi estas optimisto.

Ĉi tiu estas la Jaro de Homaj Rajtoj, kaj Universala Esperanto Asocio substrekas la rajton de la homaro uzi la internacian lingvon. Pro la fakto, ke ambasadoro ne rajtas interveni en la internajn aferojn de lando vi komprenas, ke mi tute ne parolas pri la lingva problemo en Belgujo. Mi parolas

pri diskriminacio kontraŭ la internacia lingvo, pri persekutado de la Esperanto-movado sub la diktatoroj en diversaj landoj, pri la bibliotekoj bruligitaj, pri la martiroj kiuj suferis, eĉ mortis por ke la mondo havu internacian lingvon, por ke tiuj kiuj deziras pacon povu havi komunan lingvon.

En ĉi tiu jaro, ni salutu la martirojn de la tutmonda movado, ni juru ke ilia sango, ŝvito kaj larmoj ne estu vanaj, ni solene nin dediĉu realigi la rajton de ĉiu homo, sen distingo de raso aŭ koloro, sekso aŭ politiko paroli libere al sia frato.

Vivu, kresku kaj floru nia afero!

## FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631  
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -  
„securit“ vitro  
kolorigitaj vitroj  
aluminioj senmastikaj  
stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por  
tutvitra-konstruaĵoj  
mastiko  
Telefono 272875

HET WELGEKENDE  
MAGAZIJN VOOR MODERNE HERENKLEDING



# in't duifken

GROTE KEUS  
IN GEREDERE KLEDING.

KOSTUMEN • SPORTJASSEN • BROEKEN  
UNIFORMEN • CABARDIJNEN • LODENS  
STIJLVOL HAATWERK

KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

RABATO POR ESPERANTISTOJ

## ESPERANTO-TAGO dum la int. komerca foiro en LILLE

Dum la jara internacia komerca foiro en Lille de la 8a ĝis la 19a de majo 1969, okazos Esperantotago. En proksima numero ni esperas povi doni detalojn. En la estinto jam partoprenis membroj niaj al tiu tago. Ni deziras ke estonte tio estos ankaŭ la kazo.



## La Malamikoj de Esperanto . . . . !

Esperanto havas malamikojn.

Ili estas la politikaj gvidantoj de la grandaj potencoj, precipe la Anglalingvaj kaj la Franclingvaj.

La 18an de novembro 1966 Danlando, Finnlando, Islando, Norvegujo kaj Svedujo prezentis al la ĝenerala konferenco de Unesko proponon ke la "ĝenerala direktoro destinu la necesajn financajn rimedojn en la projekto de la programo kaj budĝeto por 1969-1970, kun la celo establi internacian komisionon, konsistantan el pedagogiaj, lingvo - sciencaj kaj teknikaj ekspertoj, por objekte konsideri en kiuj sferoj ekzistas bezono por internacia lingvo kaj por esplori la eblecojn havigi rimedojn de komunikado por kontentigi tiujn bezonojn... Kio poste ĝuste okazis ni ne scias, sed ni staras antaŭ la fakto ke la jus publikigita budĝeto por la menciitaj jaroj ne entenas unu cendon por la propono de la Skandinaviaj landoj.

En oktobro 1968 okazis la 15a ĝenerala konferenco de Unesko.

Antaŭe la ŝtatoj-membroj estis ricevintaj rezoluciproponojn. Inter ili troviĝis la jena de Hindujo :

"La Ĝenerala konferenco,

konsiderante la bezonon de la popoloj, precipe la junularo, interkomuniki pli facile en internaciaj kadroj ;

konsiderante ankaŭ la kreskantan ŝarĝon, kiun signifas por la junularo la lernado de pluraj lingvoj kaj skribsistemoj ;

rekomendas ke la ĝenerala direktoro organizu kaj kunordigu esplorojn kaj studojn sur la kampo de lingvistiko, kiuj koncernu praktikajn reformojn por trovi komunan skribsistemon por interligi la popolojn..

Rimarkinde estas ke en la premiso oni parolas pri skribsistemoj kaj lingvoj ; sed ke en la rezolucio oni parolas nur pri skribsistemoj. Ĉu la Hindaj reprezentantoj timis ? Sed tio ne utilis al ili. La ĝenerala direktoro forblovis ilian proponon per konsideroj tute fremdaj al la afero.

En oktobro 1966 ĉe la sekretariato de UNO en New-York okazis la iom solena transdono de la amasa peticio favore al Esperanto. Tiun peticion subskribis preskaŭ 1 miliono da individuoj (inter kiuj 1 ŝtatestro, multaj registaranoj, parlamentanoj, lingvistoj ktp. ktp.) kaj organizoj por entute ĉ. 72 milionoj da personoj. Nu, kvankam la sekretario mem jam deklaris foje ke la Uno konsideras amasproponojn, tie-ĉi la subsekretario Narasimhan - post kiam li unue por si mem estis akceptinta la luksan eldonon de la Dia Komedio kaj tradukon de Tagore (li estas Hindu) - tutsimple diris ke li nenion povis fari per tiu amaspeticio, eĉ ne komuniki ĝin al membroj-ŝtatoj.

Por edifi ĉiujn interesiĝantojn, UEA nun decidis publikigi ĉion : verŝajne en unu de la venontaj numeroj de "La Monda Lingvo Problemo" (motivo pli por aboni tiun sciencajn revuon).

Kion la grandaj potencoj - ankaŭ en Uno kaj Unesko - klopodas akiri, tion foje Winston Churchill tre brutale sed sincere rivelis. La Atlantika ĉarto, verkita dum la milito, kaj subsignita i.a. de la sama W. Churchill, eksplicite emfazas la rajton de la popoloj pri memdestinado. Kiam konsekvence Hindujo demandis al li ĉu tio estas ankaŭ aplikebla al Hindujo, li diris : "ne. Lia Moŝto ne alvokis min por likvidi la Britan imperion." Jen, nun vi scias ĝin. Tion devas scii ankaŭ tiuj kiuj ne kontraŭstaras ke "la Angla estu la internacia lingvo... por kulturo kaj similaj...". Ili per tio ne servas la kulturon. Ili servas nur imperialisman strebadon.

Ĉu do la afero por kiu ni laboras, Esperanto, estas do antaŭe malvenkinta afero ? Tutcerte ne. Pro du kialoj.

Unue, tiuj grandaj potencoj luktas ankaŭ inter si mem. Mi donas nur unu ekzemplon. La Brita "Gas-Journal" (vol. 335, 1968, p. 299-300) konstatas ke dum la 7a mondkonferenco pri energiproduktado, okazinta en Moskvo, la okcidentaj delegitaroj estis malavantaĝigitaj pro la lingvaj aranĝoj. Due, ĝuste pro tiuj kreskantaj lingvaj konfliktoj, pli kaj pli da interesaj gvidantaj personoj venas al la kompreno ke ekzistas nur unu solvo : Esperanto.

Drs. F. Roose

Por ĉiuj viaj asekuroj - reasekuroj

unu adreso :

**J. VERDYCK & Co Pvba.**

ANTWERPEN, 8, Vleminckveld

Telef. 03/320902 - Telekso 32283 - Telegr. "Dyckassur"

Oficejoj en London - Rotterdam - Lieĝo.

Reprezentanto ĉe "Lloyd's - London"

Unuaklasa Servo

Faklerta laboro.

Korespondas en Esperanto.



# Bibliografio

## Recenzoj



Prof. Dr. Edmond Privat (†) : "Vivo de Gandhi". Eldonis "Stafeto" en La Laguna de Tenerife, Kanariaj Insuloj ; direktoro Prof. Dr. Juan Regulo Perez. Serio de la "Beletraj Kajeroj". 160 paĝoj. Prezo : 2 U.S. Dol.

La plej granda merito de tiu-ĉi libreto ne estas ke oni legas ĝin flue kiel romanon ; nek ke lingvo kaj stilo estas modelaj (tion ni ja konas de E. Privat). Sed ke la aŭtoro montras la esencon de la Gandhiismo (se mi rajtas nomi ĝin tiel). Kaj tio estas tute escepta.

Mi jam trafolumis multajn lernolibrojn kaj aliajn librojn pri historio. En ĉiuj oni mencias kelkajn ekzemplojn de pasiva rezisto kaj de fasto de la "Mahatma" sed nenie oni montras la idean bazon de tiu agado. Ne mirinde ke nuntempaj studentoj scias pri Gandhi (en la plej favoraj kazoj) nur la eksterajojn. Tio faras ke oni fakte ne komprenas tiun movadon. Sekve, en Okcidento oni emas argumenti ke tia rezistado eble taŭgas por orientanoj sed certe ne por okcidentanoj. Tiu argumento en si mem jam montras nekonon de la sistemo de Gandhi. Ĝi ja estas ideologio (kiel ĉe ĉiuj vere profundaj kaj vere grandaj movadoj aŭ reformadoj). Ĝi havas bazon de ideoj. Tiun esencon ni trovas sur paĝoj 100 kaj ĉefe sur p. 136, 142, 146. Tiu esenco estas ke vivas en ĉiu homo spirito de vero. (Oni povas kromkredi ke tiu spirito estas kaŝita aŭ subpremita). La ĉefa tasko estas vekti tiun spiriton. Tion oni povas fari nur per spiritaj (arm)iloj. De tie la metodo de rezisto kontraŭ ĉiu malmorala leĝo aŭ ago ; sed kunigita kun nepra amikeca sinteno je la aganto de tiu malmorala fakto, kaj kun nepra obeo al moraleco en ĉiuj faroj. Tamen konstantan meditadon postulas tiu sinteno, por ke oni estu konsekvenca kaj logika en ĉio, ĉie, ĉiam. Se oni bone komprenas tion, oni komprenas plene tion kion Gandhi faris... kaj oni admiras ĝin. Kaj oni konscias ke nur ĝi estas la vojo (ekzistas nenialia vojo) kiu povas konduki la homaron al paco kaj justeco. Mi devas konstati ke en preskaŭ neniuj lernejoj oni instruas la instruon de Gandhi. Tio estas tute simple skandalo. Al kio servas la instruado de historio, se oni konatigas nur la strebadon de imperialismoj kun iliaj tiel nomataj "grandaj" figuroj ? Eĉ respondeculoj pri tiu fako ŝajne ne komprenis ke la apero kaj la agado de Gandhi estas la plej grava okazintaĵo en la mondhistorio de post la apero kaj agado de Mohameto. Ankaŭ tute prave E. Privat montras la parencecon inter Gandhi kaj Zamenhof. Vi mem, leganto, serĉu parencecon inter G. kaj Kristo.

Okpaĝa biografia indekso finas la libron ; tiel ke ni scias kiuj estas la personoj menciitaj. Ankaŭ ilustrajoj plivalorigas ĝin. Ekzistas de tiu trezora libreto nur 1.500 ekzempleroj. Rapidu aĉeti. Legu ĝin. Se vi konas studentojn esperantistojn, je okazo donacu al ili tiun libron.

Drs. F. Roose

La libroj estas haveblaj ĉe la librejo „Sonorilo” (S-ro Iserentant R.)  
Kerklaan 61 BRUGO, Poŝtĉekkonto 152140

Wiliam Auld : "Paŝoj al plena Posedo". Studolibro. 238 p. Eldono de "Heroldo" 13, Pippelingstraat (Rue de la Reinette) Bruselo 1.

Prezo : 1.60 Us. Dol. ĝis elĉerpiĝo de la kvanto en Bruselo. Poste 2 Us. Dol.

Tiu tre interesa libro estas destinita al Esperanto-lernantoj ĉe kiuj la aŭtoro supozas "...posedon de la gramatiko kaj elementan vortprovizon de ĉ. 700 vortoj" (p. 5). Ĝi do estas perfektiga lernolibro. Ĉiu de la 30 "paŝoj" komenciĝas per vortlisto. Tiam sekvas legajo ; fine estas ekzercoj. Ni tuj diru ke la legajoj estas interesaj. Estas tradukoj el diversaj naciaj lingvoj, eroj el kongresparoladoj de Zamenhof, kelkaj aliaj esperantaj originalaĵoj. Rimarkoj : 1) kelkaj vortoj kies klarigo mankas, devis esti klarigitaj. Aŭ ĉu la aŭtoro eble pensas ke vorto kiel "transigante" (jam en la dua linio de la unua "paŝo") ne bezonas klarigon por la "progresinto" ?) Sur p. 46, nr. 42 ni trovas klarigojn pri la pasivaj adjektivaj participoj... kiuj estas malkompletaj se oni akceptas la "itision" aŭ aspektan sistemon. Efektive, "estis -ita" ne ĉiam signifas ke la ago estas antaŭa al la tempo pri kiu oni parolas. Ĝi povas ankaŭ signifi ke la ago okazis en tiu preciza tempo, sed venis al fin(i)ĝo, al rezulto. Tial oni devas fari distingon inter kelkaj kategorioj de verboj laŭ ilia daŭro kaj laŭ ilia rezulto aŭ ne-rezultado. Sed versaj-ne tio estos por iu "superperfektiga" kurso. Mi devas diri ankaŭ ke tiujn regulojn kaj teorion oni povas trovi en kelkaj (polemikaj) libroj ; ankaŭ en la scienceca "Lingvo kaj Vivo" de Prof. G. Warringhien, sed, laŭ mia scio, ankoraŭ en neniuj lernolibroj (mi estas tre scivolema, kial ne ?).

Kiam mi plu lernis esperanton post la kurso, mi legis komikajojn en la verkoj de R. Schwartz. Mi notis la vortojn kiujn mi ne komprenis, serĉis ilin, kaj poste relegis la tekston... kun ĝuo kaj profito. Nun oni havas tiun laboron preta en jena libro, kiun tial mi tre rekomendas. Sed precize ĉar oni devas plu legi kaj lerni, estas bedaŭrinde ke en la librolisto sur p. 230-2, "por paŝi pluen", oni ne trovas (krom unu) tiujn komikajn libretojn de R. Schwartz. Je kaj tie oni povas ankoraŭ akiri ilin. Aliflanke mi ne metus en la listo la "Unufingraj Melodioj" malgraŭ ke ĝi estas de la sama aŭtoro kiel de ĉi-tiu studolibro. Kion eĉ progresinto faros post legado de ekz. "Noktaj Pensoj" en tiuj "Melodioj" ?

Pro la fakto ke la legajoj estas prenitaj ne nur el la "klasika Esp.", sed ankaŭ el modernaj publikajoj kiel ekz. el "Norda Prismo", oni ne miru trovante kelkajn (necesajn) neologismojn. Ekzemploj : konferanseco por programestro ; servico por manĝilaro (p. 49) ; incendio por brulego (p. 83). Sed ĉefe, kion diri pri "polilingvismo" (p. 89) ? Ni ja havas "plurlingvismo" kaj "multlingvismo" ; pravigebla estas ankaŭ poliglotismo ; sed kiamaniere pravigi polilingvismo ? Nu, jes, se oni volas instigi la lernanton por koni esperanton komplete, li devas ekkoni ankaŭ ĝiajn malsanojn.

Tiuj rimarkoj (eble iom ironiaj, se vi pensas tiel) tamen ne devas fortimigi vin de la libro. Mi opinias tiun lernolibron nepre necesa post unua kurso. Ni ne ankoraŭ havis tiun libron. Ĉiuj gvidantoj de perfektigaj kursoj benos la aŭtoron ke li verkis ĝin.

Hilda Dresen : "Norda Naturo". Poemaro. 144 paĝoj. Prezo : 1.50 Us. Dol. Eldono de "Stafeto" en La Laguna, Kanariaj Insuloj.

Pro du motivoj mi ĉiam ŝategis legi literaturajojn de popoloj fore fremdaj al mi : por konstati kiamaniere tiuj "fremduloj" sentas ion ; esprimas ideojn kaj sentojn, uzas simbolojn kaj kiajn simbolojn. La dua motivo estas : ĉu mi trovas ion komunan kun mi, kun mia popolo kaj komunan kun la homaro ĝenerale ? Estas ĉiam en tiu atendo kaj kun tiu atento ke mi legas ilin. Nu, en la poemo "Kion diri, kiel miri" sur p. 138 mi trovis ion de G. Gezelle en la bildoj kaj en la signifo. Kaj ion de la spirito de Alice Nahon, ŝajnas al mi, mi trovis en "Vizaĝoj" (sur p. 111-112). "Zamenhof" (p. 124-6) estas plena de sento -tro da sento, eble kelkaj opinioj ? - sed ankaŭ tion ni bezonas por viviĝi la lingvon esperanto. Kelkaj temoj estas jam tiom pritraktitaj, ke nur tute originala esprimmaniero aŭ ideo povus ankoraŭ allogi ; vidu p. 116 "Surstrate". Se "Malbenita humoro" (p. 99) estas iom banala, kontraŭe multaj poemoj estas tre belaj kiel ekz. "preĝo" sur p. 77 kaj "momentoj" sur p. 106. Multaj poemoj temas pri iu seniluziigo. Entute bela poemaro. Banala ripetado, sed en tuta objektiveco : ĝi pliriĉigas nian literaturon. Nur mil ekzempleroj estas presitaj. Do rapidu aĉeti ĝin.



D-ro Pol Denoël : "L'Espéranto dans l'enseignement". Eldonis la Fondajo M. Jaumotte-Loquet. Prezo : 15 belg. Fr.

Tiu nur 24paĝa broŝuro estas eksterordinare riĉenhava. Antaŭparolas ĝin emerita profesoro de la Lieĝa universitato kaj enkondukas ĝin lerneja inspektoro. Jen jam du valoraj voĉoj favoraj al Esp. La aŭtoro respondas la demandojn "Kial Esp. en la lernejo" per la kompetentaj eldiroj de famulaj kiel Mario Pei, Prof. de Boer kaj de multaj aliaj. Mem li klarigas la valorajn ecojn de Esp. Poste evidente montras la avantaĝojn kiujn la studo de Esp. alportas. Sekvas tiam superrigardo pri la stato de la Esp.-instruado en la diversaj landoj. La multaj piednotoj donas scian valoron al la verketo : ĉar donas la fontojn el kiuj li ĉerpis la informojn ; tiel ke la argumentoj estas ne nuraj "diraĵoj" nekontrolablaj. Same necesas, kaj do troviĝas bibliografio. Tia verketo en la mano de respondecaj personoj pri instruado signifas la plej bonan eblan propagandon. Bedaŭrinde ke ne io simila ekzistas en la Nederlanda lingvo.

J. H. Sullivan : "La Junaj Trezorserĉantoj" 24 p. kaj "La Longa Marŝo" ankaŭ 24 p. Eldonis Esperanto Teachers Association. " Prezo : ambaŭ kostas du silinĝojn. Haveblaj ĉe British Esperanto Association,

La libretoj estas destinitaj por knaboj kiuj sekvas esp.-kurson la duan jaron. La aŭtoro iĝis jam fama per la junuleca verketo. "La Juna Detektivo". La stilo estas simpla. La enhavo estas sufiĉe streĉa. Do agrabla legaĵo por junaj knaboj.

**Du Uzbekaj poetoj prezentitaj de Petro Poliŝĉuk el Taŝkent en Uzbekistano, Siberio.**

Temas pri du broŝuroj. La unua kun sep paĝoj prezentas la poeton kaj pensulon Alisŝer Navoij, kiu naskiĝis en 1441 kaj mortis en 1502. La dua prezentas modernan Hamid Alimĝan, kiu nakiĝis en 1909 kaj mortis en 1943 apud Smolensk en la milito.

Jen estas la mirindaĵo de Esperanto, ke ĝi konatigas al ni kulturojn, kiujn ni alie ne atingus. Ja, en kiu antologio aŭ manlibro ni povus legi pri malproksima Uzbekistano ? Nur en tre specialista publikigaĵo, kaj eĉ ne tie, eble ?

Kompreneble oni povas demandi ĉu la tie-ĉi prezentitaj pecoj havas valoron. Literaturajo povas havi literaturan valoron, sed ĝi povas havi ankaŭ literaturhistorian valoron. La vere artaj kreaĵoj havas ambaŭ. Ne-artaj aferoj povas havi la due menciitan valoron. De A. Navoij estas prezentitaj nur du paĝoj da poezio ; tio estas tro malmulte por ke oni povu juĝi pri lia verkado. La poemo de Hamid Alimĝan, kiun P. Poliŝĉuk tradukis komplete, prezentas artmaniere la novan etoson en la kolhozoj. Adreso kien oni skribu por akiri tiujn broŝurojn : Ing. P. Poliŝĉuk, Novo-Moskovskaja 18, kv. 15 - Taŝkent, Uzbekistano ; Sovjet-Unio. Grandan dankon ni ŝuldas al nia samideano Poliŝĉuk. Li konsciis bone kiun valoron argumenton li donas al ni por substreki la kulturen valoron de Esperanto. Kaj tio estu lia rekompenco.

#### **INTERNACIA ESPERANTA FERIO-CENTRO VOLPARIJA - JUGOSLAVIO**

Administras : Esperanta societo Ljubljana, Tavčarjeva 2/1, P.f.401  
Pensiona prezaro por 1969

Cefsezono - de la 16-a de junio ĝis la 31-a de aŭgusto :  
A. En la vilaoj I kaj II.... US. dol. 3.60  
B. En la vilao III.....US. dol. 3.20

Antaŭsezono - de la 15-a de majo ĝis la 15-a de junio kaj

Postsezono - de la 1-a ĝis la 30 de septembro :  
A. En vilaoj I kaj II.... Us. dol. 2.90  
B. En la vilao III..... Us. dol. 2.60

Infanoj en la aĝo ĝis 7 jaroj : sen aparta lito ricevas 50 % rabaton  
kun aparta lito ricevas 30 % rabaton

En la prezoj estas enkalkulitaj kompleta pensio, turista kaj banimpostoj.

Por unu-lita ĉambro oni alpagas 0.70 Us. dol.

Ĉe la rezervigo oni antaŭpaga minimume por tritaga pensio al nia bankkonto (por eksterlandanoj) nro : 501-620-7-32002-10 461, Kreditna banka in hranilnica, Ljubljana. Oni povas pagi per iu ajn okcidenta valuto aŭ en dinaroj.



## KRONIKO

### **Arthur Koestler kaj la malbena de la lingvo**

Tiu tre fama verkisto kaj iom originala (sed ne ĉiam prava) pensanto, en sia verko : "Le cheval dans la locomotive" (eldono Calman Levy) je paĝo 289 de la ĉapitro "La malédiction du langage", diras : "Ĉe la homoj, la disigaj fortoj de la parolo laboradas ĉie : lingvoj naciaj kaj tribaj, dialektoj, vortaroj specialistaj kaj klasaj akcentoj, profesiaj speciallingvoj. Estas tute rimarkinde ke en epoko en kiu la Herzaj ondoj kaj la satelitaj amasigas ĉiujn popolojn en unu publikon, neniu respondeca organizo (escepte de manpleno da obstinaj esperantistoj) faras iun ajn penon por propagandi iun "Lingua Franca" universalan ; samtempe individuoj lasas sin buĉi pro la unuarangeco de la Maharatju aŭ de la Gurajati en Hindujo, de la Flandra aŭ de la Franca en Belgujo, de la Franca aŭ de la Angla en Kanado., (laŭ "SAT-Amikaro" Jan. 1969 ; p.11)

### **Ankaŭ malbona novaĵo havu sian lokon tie-ĉi.**

Ekzistas en Esperanto kelkaj fakaj revuoj. Nu, "Kemio Internacia" post tri jaroj de regula aperado, ne plu aperos. Kaŭzo : ne sufiĉe da interesiĝo flanke de la esperantistoj ; kaj ne sufiĉa abonombro.

Kaj, fakte, ĉu la "Geografia Revuo" ankoraŭ ekzistas ? Ni en longa tempo ne plu aŭdis ion pri ĝi ?

### **Kompetenta specialisto-filologo apogas nian lingvon.**

La Usona instituto "Public Affairs Committee" publikigos 28 paĝan informan broŝuron, verkitan de D-ro Mario Pei pri la problemoj de internacia komunikado. I.a. li pritraktos la argumentojn por akceptigo de la Angla aŭ alia nacia lingvo, kaj tiam montras ke nur Esp. estas la logika solvo. Tre valora estas ke la broŝuro estos en Angla lingvo kaj eldono de Usono. Tio en si mem estas jam potenca argumento favora al ni. Ankaŭ ni aĉetu ĝin grandnombre kaj propagandu ĝin ĉe la multaj Anglosciantoj.

### **Belgaj administrantoj faras kelkfoje ankaŭ ion bonan.**

Estas kutimo de ne malmultaj belgoj kritiki ĉiun kaj ĉion kiu kaj kio estas belga. Nu, la Internacia Akademio de turismo, sub protektado de princo Rainier de Monako, havis sian jaran ĝeneralan kunvenon en oktobro lastjare. Ĝi decidis ke en la internacia vortaro turisma, kiu estos redaktata multlingve, la turismaj vortoj estos ankaŭ publikigitaj en Esperanto. Tio estas rezulto ĉefe de la pozitiva sinteno de la Belga ĝenerala komisararo de turismo, S-ro Haulot.



## GRESILLON

### PRESENTAS en 1969

La Esperantista Kulturdomo de Grésillon en Baugé prezentas tiun-ĉi jaron :

- 1) de 23-2-'69 ĝis 2-3-'69 : Seminario por kurs— kaj grupogvidantoj
- 2) dum Pasko-ferio de 6a ĝis 12a aprilo : komenca kurso de Esp. per rekta metodo ; kaj praktikado de la lingvo.
- 3) 29a de junio ĝis 13a de julio : a) Esperantaj studoj ; b) la Franca lingvo per Esperanto.
- 4) 13a julio ĝis 20 julio : 8a Kultursemajno : pedagogio ; tekstoj.
- 5) 20a de julio ĝis 3a de aŭgusto : kulturaj kaj turismaj ferioj internaciaj : prelegoj de diverslandanoj.
- 6) de 3a aŭg. ĝis 24 aŭg. : kursoj pri librobindado, fotoarto, teatro
- 7) 24 aŭg. ĝis 7 sept. dua studperiodo pri kurs- kaj grupogvidado.

En ĉiuj aranĝoj estas ekskursoj kaj distraj vesperoj.

Petu informojn pri prezo de restado.

Tiu instituto prezentas ankaŭ revuon : "Kulturaj Kajeroj", kiu havas legantojn en jam 40 landoj. La enhavo plej varia. Ekz. : la plej valoraj prelegoj kiujn oni aŭdis en la studperiodoj.

Kontraŭ respondkuponon vi povas ricevi provnumeron ĉe S-ano P. Babin 13, Bd. de la Chauvinière. 44-Nantes Francujo.



Ensendojn por la

printempa

numero ni petas

antaŭ la 1.5.1969

(aperdato komence

de junio)

## FONDAĴO M. Jaumotte-Loquet

FONDAĴO por la Disvastigo de la Informado pri ESPERANTO

Transpreno	124.141 F
Anonime	1.000 F
	125.141 F

(Pagoj akceptataj pere de la pĉk 291429 de Maertens Gr. Sint-Kruls)

## KAPITALO HODLER 68

### Institucio fondita

En la revuo Esperanto (paĝoj 97, 134 kaj 181 de resp. la jul/aŭg., sept. kaj dec. numeroj 1968), en la Praktiko (paĝo 108 de la jul/aŭg. numero 1968) kaj en aliaj gazetoj jam aperis diversaj artikoloj pri la iniciato fondi novan kapitalon Hodler, omaĝe al la fondinto de Universala Esperanto-Asocio en la jaro de la 60-jara ekzistado de la Asocio, kun la celo, per ĝiaj fruktoj regule subteni la financojn de UEA.

La afero jam ricevis firman bazon. Estas fondita aparta institucio kun propra statuto, oficialigita per notaria akto de la 28-a de oktobro 1968. Tio garantias al la pruntantoj maksimuman sekurecon. La institucio havas juran personecon en Nederlando.

Oni povas partopreni en la kapitalo per pruntoj de po 1000 ned. gid. aŭ per donacoj de iuj ajn sumoj. Por la pruntoj estas du eblecoj : a, prunto je rento de 2 % kaj daŭro de 10 jaroj kaj, b, prunto sen rento kaj daŭro de 6 jaroj.

Ĉiu pruntanto ricevas oficialan dokumenton per kiu la institucio rekonas la ŝuldon al la koncerna persono aŭ instanco. Krome, ĉiuj pruntantoj, same kiel ĉiuj donacintoj de 500 gld. aŭ pli, ricevos ĉiujare raporton pri la agadoj kaj financa mastrumado de la institucio. Ĝis nun, pruntoj ĝis ĉ. 78 000 gld. kaj donacoj ĝis ĉ. 45 000 gld. jam estas anoncigitaj kaj grandparte ricevitaj. Ĉiuj, kiuj promesis pruntojn sed ankoraŭ ne sendis la koncernen sumon, ricevis inviton nun transigi ĝin.

Ni varme rekomendas al ĉiuj legantoj de tiuj ĉi linioj esplori, ĉu ili havas eblecon partopreni en la Kapitalo Hodler 68, ĉu per prunto de 1000 gld. (4000 steloj), ĉu per donaco aŭ donaceto je iu ajn valoro. La donacoj ĝis nun ricevitaj varias de kelkaj guldenoj ĝis kelkaj miloj da guldenoj. Ĉiuj donacoj estas same alte taksataj. Per partopreno aŭ kontribuo oni efike helpas al plisolidigo de la financa bazo de UEA, kiu ja estas la spino de ĝia agado por efika plivastigo de la Internacia Lingvo Esperanto.

Intertempe la institucio jam ekhavis proprajn bank- kaj poŝtĉekkontojn, tiel ke oni povas de nun sendi ĉiujn sumojn rekte al tiuj kontoj kaj ne plu bezonas sendi pagojn al la kontoj de UEA. Jen la kontoj :

**Banko** : Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam ; konto no. 25.50.51.816 / 824 je la nomo de : "Stichting Hodler 68" (Institucio Hodler 68), p/a F-ino M.H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 II Rechts, Rotterdam-2 ;

**Poŝtĉekkonto** : no. 16.87.544 Nederlando, same je la nomo de "Stichting Hodler 68" (Institucio Hodler 68), kaj je la sama adreso kiel la bankkonto.



## ANTVERPENO

Esperanto-grupo "La Verda Stelo"  
Kunsidoj: Ĉiuvendrede en Brasserie  
"Capitole", Gemeentestraat 15  
Antwerpen je la 20,15a horo.  
Poŝtaĉknumero: 726.54,

# GRUPA VIVADO

La 11an de oktobro, s-ro J. Haazen kondukis nin al la pratempo, klarigante kiel tiam la muziko ekestis. Per interesaj sonbendoj li aŭdigis niajn unuajn paŝojn en la direkto de la nuna muzikarto. Krome s-ro Haazen pri-traktis "Radioprogramoj en Esperanto" kaj ankaŭ per aŭdigoj li invitis nin al plia aŭskultado de la esperantaj radioelsendoj.

La 18an, s-ro F. Herman, specialisto pri kvizoj, esploris nian konon pri flagoj de komunumoj kaj landoj. Du valoraj premioj estis donacataj al la gajnintoj: s-roj Van Eynde kaj Frederickx.

La postan semajnon okazis la ĉiujara mitulvespermanĝo en vere amikeca atmosfero. F-ino A. Geelen prizorgis diversajn ludojn kun kvindeko da libropremioj kiuj estis disdonataj al ĉiuj ĉeestantoj.

La 8an de novembro, s-ro F. Schellekens aranĝis turistan vesperon. Tiu ĉi fojon s-ro Schellekens veturigis nin al kaj tra Suda Germanujo.

Je la monatemzo venis la kutima filmvespero. Kvin filmoj el kiuj kvar en la nederlanda kaj unu en la esperanta lingvoj. Ili estis prezentataj de s-ro R. Van Eynde. La esperanta, pri la bakista metio sur la insulo Luzon (Filipino), estis elfrancigita de s-ro P. Peeraerts kaj parolata de la sama persono kun la teĥnika helpo de s-ro J. Haazen.

La 22an de la sama monato, s-ro Maertens venis el Bruĝo por revivigi al ni la Karavanon al la Suno, la vojaĝo de la esperantistoj per aŭtobuso al la internacia Kongreso en Madrido. Tiel por la kunveturintoj kiel por la hejmerestintoj, la vespero iĝis vere alloga.

Unu semajnon poste, "La Verda Stelo" estis denove honorigata pro la veno de eksterurbano, nome s-ro De Brouwere el Kortrejko kiu prezentis neordinaran turisman vesperon: vojaĝo al Hindujo kaj Nepalo. La aplaŭdo ĝojo je la fino pruvis ke la ĉeestan-

taro vere kunĝuis liajn libertempajn travivaĵojn.

La 6an de decembro nia vicprezidanto, s-ro R. de Roover, faris raporton kun lumbildoj pri sia vojaĝo tra Jugoslavio. Li, kiel ĉiam, montris la plej pitoreskajn partojn de la vizitita lando, inter aliaj la Esperanto-vilaĝon Primošteno. Krom tio S-ta Nikolao surprizis la Verdstelanojn disdonante fruktojn kaj kuketojn.

La 13an okazis la Zamenhof-vespero en la kadro de la Antverpena Esperanto-Komitato Intergrupa (EKI) en la salono Capitole. Eksterordinare granda grupo da vizitantoj ĝuis la programon kiu estis kompilita de s-roj Herman kaj Haazen. En speciale bele ornamita salono (fare de la juna sekcio), s-ro Van Eynde, vicprezidanto de EKI, salutis ĉiujn ĉeestantojn. Poste s-ro P. Peeraerts transprenis lian taskon kaj enkondukis la diversajn programerojn. S-ro J. Haazen prelegis el la vivo de D-ro L.L. Zamenhof kun la kunlaboro de sia talentplena edzino. Longa aplaŭdo estis la pruvo de ĉies admiro.

S-ro Wuyts, jonglisto, kaptis ĉies atenton kaj, kun kelkaj helpantoj el la ĉeestantaro, alportis vere neordinarajn "nekompreneblajojn".

La duo Amorgasti mirigis ĉiujn per diversaj profesie farataj dancoj kaj la gefratoj Visterin prezentis seson da ege belaj kantoj laŭ ĉarma maniero.

Dimanĉon, la 15an la infanoj de la gemembroj estis invititaj al la Kristnaskfesteto kiun La Verda Stelo organizas ĉiujare. ± 34 gefiloj ĉeestis kaj travivis kelkajn agrablajn horojn. S-ro Maur. Jaumotte, kiel kutime, estis la "promotora" kaj komentis bonhumore la diversajn kontribuojn de la infanoj al la programo: deklamado, kantado, k.t.p. eĉ en Esperanto (kiel ekzemple F-ino Viviane Jaumotte, la nepino de la Prez.). Regala festo kun kukoj kaj ĉokolado agrable interrompis la ampleksan programon. S-ro Paul Herremans, filo de S-ino A.

Slootmans, aktivis kiel jonglisto kaj surprizige entuziasmigis la junan publikon (kaj kial ne la plenkreskulojn!) per siaj lertajoj en pluraj numeroj. "Patro Kristnaska" (S-ro R. Balleux) vizitis la feston kaj kunportis abundajn donacojn kaj frandajojn. Estis ia kulmino de la vespero! Kontentege la infanoj kun la gepatroj rehejmiĝis. Grandan laŭdon meritas plu: S-inoj Marg. Jaumotte, Nath. Balleux kaj J. De Hondt pro la ampleksa antaŭfesta lobo (aĉetado, pretigado, dividado de l' donacoj, k.t.p.) kaj la gejunuloj de la grupo pro la belega ornamado de la salono kaj ties pli agrabla aspekto!

La 20an jam en la signo de Kristnasko S-ro J. Verstraeten prelegis el libro de G. Walschap "Een mens van goede Wil" de l' parte tradukita. F-ino A. Geelen, kiel festestrino, aranĝis originalan tombolon sen numeroj sed kun premioj por ĉiuj! Regis festa atmosfero kaj oni povis konkludi, almenaŭ tion diris la Prez. Jaumotte, ke la vespero bone sukcesis.

Por enkonduki la novan jaron 1969an, vendredon, la 3an de januaro, S-ro I. Durwael, la Vic-prez., trovis la ĝustan temon: "Rerigardo al la Jaro 1968a". Estis agrabla kaj certe interesa revidi (pere de lumbildoj) kaj aŭdi la komenton pri la okazintaĵoj, jen ĝojigaj, jen dolorigaj, kiuj plenigis la pasintan jaron!

La 10an S-ro J. Lernout paroladis kaj montris amason da diapozitivoj pri "La Spirito de la Renesanco". Li havigis al la multnombra ĉeestantaro fortan impreson pli longa periodo kiu, el multaj artaj, sciencaj kaj filozofiaj vidpunktoj, havis grandegan signifon en la historio de la homaro.

La 17an dum la ĝenerala jarkunsido Prez. Jaumotte laŭdis kaj dankis siajn kunlaborantojn kaj honorigis jenajn ĝejubileantojn, havante por ĉiu aparte specialan afablan vorton: S-roj H. Boffejon kaj Roger Jaumotte por 40-jara fidela membreco. Krome, ambaŭ ricevis la artan plakedon pro "veteraneco". Pro 15-jara fidela membreco estas distingitaj: F-inoj Marit kaj Herlinde Montmirail, S-ro kaj S-ino G. Vanderscheuren. Ricevis bronzan medalon pro 10-jara fidela membreco: F-ino Viviane Jaumotte, F-ino E. Creemers, S-ino P. de Roover, S-roj W. De Smet, M. Du Bois, G. Roels kaj J. van Steen. Oni varme kaj longe aplaŭdis

dum festa kaj amika sfero ekregis... La sekretario kaj la kasisto, respektive S-roj J. Verstraeten kaj R. Balleux, prezentis siajn jarraportojn kiujn oni aprobis, precipe ĉar la kaso donas malgrandan profiton!

Dimanĉon, la 19an, en restoracio "A la Coupe Glacée" 30 geverdstelanoj, bruselanoj kaj geedza paro el Parizo kuniĝis en sama festa sfero por ĉeesti al agrabla kaj abunda bankedo. La Prez. Jaumotte bonvenigis ĉiujn laŭ sia bone konata, gaja maniero kaj akcentis la amikecon kaj bonhumoron kiuj regis inter la festenantoj. S-ro J. Verstraeten respondis kaj S-ro R. Jacobs, Prez. de Brusela Grupo, salutis la ĉeestantojn nome de sia grupo. S-ro I. Durwael toastis je la sano de la sinjorinoj transdonante belajn vivantajn florojn al S-ino Marg. Jaumotte, prezidantedzino. F-ino Cl. Peeters, nome de la sinjorinoj, respondis kaj dankis per spritaj vortoj; siavice ŝi transdonis belan donacon al Prez. Jaumotte. Malfruiĝis jam kiam la lastaj festenintoj foriris! Bela vespera foriĝis!

La 24an S-ro R. Jacobs, Prez. de Brusela Grupo Esperantista, venis al Antverpeno kaj raportis pri sia "Krozado al Grekujo kaj Egiptujo" kaj montris amason da rimarkindaj diapozitivoj.

La 31an S-ro R. Van Eynde prezentis dokumentajn filmojn. Unu estis parolata en Esperanto. Tio dank' al la kunlaboro de F-ino M. Montmirail, S-ro J. Montmirail, Paul Peeraerts (tradukinto de la franca teksto kaj parolisto) kaj S-ro R. Van Eynde (teĥniko).

## FAMILIA VIVO:

Malsano de S-ro Maurice Jaumotte, nia Prezidanto:

Pro subita falo nia Prez. akiris "cerbo-skuigon" kaj tiom grave malsaniĝis ke la kuracisto malpermesis al li ĉiun aktivecon! Li devas ripozi entute almenaŭ dum kelkaj semajnoj!

Ni ege esperas ke nia kara Prez. plej rapide retrovos plenan sanon kaj ke li ne tro suferas pro la deviga "mal-aktiveco"!



## ESTONTAJ PROGRAMOJ

**ATENTU : BONVOLU** ĉiam enrigardi la ĵurnalojn pro eblaj ŝanĝoj en la programo.

### M A R T O

VENDREDOJN.

la 07an : **PAROLADO kun LUMBILDOJ** de Prof. W. De Smet pri "Kiusence la Delfenoj estas inteligentaj"

la 14an : **DOKUMENTA FILMVESPERO** organizata de S-ro R. Van Eynde. Unu filmo estos en Esperanto.

la 21an : **DEBATVESPERO** enkondukata de S-ro R. Van Humbeeck pri "La Aŭtoritata Krizo"

la 28an : **PAROLADO kun LUMBILDOJ** de S-ro G.C. Fighiera pri "La Krucmilito kontraŭ la Katharistoj".

**La 3 danaj ministroj** pri kulturo, instruado kaj eksterlandaj aferoj devas ricevi fortan impreson pri la uzado de esperanto Tial ni petas alsendon de 3 ekz. de ĉiusepacaj broŝuroj, klubaj informiloj, revuoj, libroj ktp. Post la transdono ĉiu kontribuinto ricevos raporton. Inĝeniero Ib Schleicher, Ved Bellahoj 21.13. DK-2700 Kopenhago BRH. Danlando. Prezidanto de Centra Dana Esperantista Ligo.

### BRUĜA GRUPO ESPERANTISTA, REĜA SOCIETO.

Kunvenoj : principe 1-an kaj 3-an mardon de ĉiu monato, je la 20-a horo, en "Strijdershuis" Hallestraat, 14 (apud "Markt").

Adreso de la prezidanto : Ch. Poupeye, Filips de Goedelaan, 17-bis, Brugge. Tel. (050) 183.58

Por feste komenci la novan jaron, la grupanoj gaje kunvenis la 7-an de januaro dum agrabla vespermango en tipa kampara restoracio en Oostkerke.

La 21an de januaro ordinara kunveno okazis en "Strijdershuis", dum kiu artikoloj el Esp. revuoj estis legataj kaj komentariataj.

Dum la kunveno de la 4a de februaro, la ĉeestantoj debatis pri la organizo de la Markola Esp. Kongreso en

Bruĝo (3an kaj 4an de majo) kaj decidis aktive kunlabori al ĝia organizado.

Membroj, kiuj ne jam repagis sian kotizon por 1969, estas petataj tion fari urĝe al P.C.K. N° 4835.33 de "Bruĝa Grupo Esperantista, St-Kruis" Baza kotizo kun abono al "Sonorilo" : 150 Fr ; plia familia membro : 50 Fr.

### REĜA ESPERANTISTA BRUSELA

#### GRUPO

Sidejo : Hotelo "EXELSIOR",

7, strato de la Progreso, Brusela la

M A R T O 1 9 6 9

10an : S-ino Léa BERNAERTS (el Antverpeno) parolados pri aktuala temo : "Gandhi kaj la Vero".

17an : Perfektiga Kurso, fare de S-ro David van der STEMPEL.

24an : MITULVESPERO, je la 19 H 30, en restoracio "Le Roi des Moules" (24, rue de la Vierge Noire, apud place Brouckère), organizota de S-ino Rose JACOBS.

31an : Diskutvespero pri elektota temo el la parolata ĵurnalo.

HELPU NIN PAGANTE AKURATE VIAN KOTIZON 1969 KAJ MEMBRIGANTE VIAJN FAMILIANOJN KAJ GEAMIKOJN ! SAMIDEANOJ KAJ SIMPATIANTOJ ESTAS ĉiam KORE BONVENAJ !

### KARLOREĜA GRUPO ESPERANTISTA

#### CHARLEROI

Programo de Februaro :

Ĵaŭdon la 6an je la 20 h.

Kutima kunveno : novaĵoj de la movado, babilado, legado, k.t.p.

Sabaton la 15an je la 19 h. 30

Okaze de la komenco de la Semajno de Internacia Amikeco :

Vespermango ĉe Restoracio : LA BROCHE.

Ĵaŭdon la 20an je la 20 h.

Jara ĝenerala kunveno

Ĵaŭdon la 27an je la 20 h.

Projekciado de diapozitivaj

La kunvenoj okazis kiel kutime ĉe la Kafejo LE CAROLE, Place Charles II, ĉe Charleroi.

### LIEĜO

20, rue V. Raskin

La 4an de sept. rekomenciĝis la regulaj kunvenoj. Dum la somero estis dissendita de la vicprezidanto de mandaro al ĉiuj gemembroj kial ili ne ĉeestas la kunvenojn. Neniun respondon li ricevis. Sed en la kunveno de la 4a sept. S-ino Lejeune deziris perfektigan kurson. Ni decidis doni ĝin ĉiun trian semajnon de la monato. Jen la temoj kiujn ni pritraktis dum la kunveno : D-ro Denoël pri la projekto "Esp. en la lernejoj (vidu "Sonorilo" 60a jaro, nr. 4,p.58) - diskuto pri de kaj da. - studo de la libro de prof. Waringhien "Lingvo kaj Vivo". - Ni partoprenis trilandan renkontiĝon de Düren, la 29 de sept. '68. - Zamenhof-festo la 14an de dec. en la hejmo de Ges. Kuster : honorigo de la vicprezidanto, Valona verkisto Jean Pirard. - raportoj pri la laboroj plenumitaj de la "administrantaro" kaj "estraro" de BEF. -

Noto : la skabenaro de Embourg petit de ni novan kurson por infanoj. D-ro Denoël decidis unue "ataki" la gepatrojn per prelego kaj poste eventuale per diskutado. Protokolanto : S-ano M. Lemme, Rue Vivegnies 28 ; Lieĝo.

### VERVIERS

Programo.

London la 6an de januaro.

Parolado de S-ino HERION ; kun dia-

LES ENTREPRISES

# DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO 3

Tel. : 16.89.92      Entrepreno de  
KONSTRUAĴOJ

pozitivaj : "La Internacia Semajno en Romans, Drome".

London la 20an de januaro.

Parolado de S-ro Joseph RENARD, kun diapozitivaj : "Mia dua vojaĝo en Londono".

London la 3an de februaro.

Parolado de S-ro Jos. HERION.

"Internacia Civil Servo".

London la 3an de marto.

Parolado de S-ino VANBREUSE, kun diapozitivaj : "Promenado tra Luksemburgo".

London la 17an de marto.

Parolado de S-ro José JACOB, kun diapozitivaj "Dua parto de la Evoluo de la Vivantaj Estajoj".

London la 14an de aprilo.

Parolado de S-ro Raymond DEMARCHE, kun diapozitivaj : "Vojaĝo tra Bulgarujo kaj Turkujo".

London la 28an de aprilo.

Parolado de S-ro Toussaint DEMARCHE ; kun diapozitivaj : "Evoluo de la laboroj ĉe "La Gileppe".

## KORESPONDANONCOJ

Inĝeniero Boguslaw SZUBA, BRWINOW ul. Lilpopa Nr. 36 m 4 Polujo deziras korespondi pri filatelio, geodezio, turismo kaj inĝenieraj aferoj ; deziras ankaŭ intersanĝi poŝtmarkojn. Li garantias respondon.

Instruistino 19jara, fraŭlino Kalinka Stefanova Genova v. TIHOMIR, Dkr. Karga-lijski Bulgarujo deziras korespondi kaj intersanĝi bildkartojn.

28jara flegistino en operaciejo de Roman-antikva urbo, deziras korespondi kun gesamideanoj de nia lando.

F-ino Nina Pavlova MIHAJLOVGRAD Str. B. Bistrica 9, Bulgarujo.

Nia klubo estas malfermata ĉiutage ; ĉirkaŭ cent anoj vizitis ĝin semajne. Multaj de ili volas korespondi kun geamikoj el diversaj landoj pri diversaj temoj.

Pro tio ni petegas vin, bonvulu anonci nian adreson. Jen estas ĝi :

Bulgario, Sofio  
P.K. 930, Ilute



manufakturaĵo ĉirkaŭ DE BROUWERE

Magdalenastraat 29 Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216.54

## VIRINAJ BLUZOJ " MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko  
por la eleganta sinjorino  
la perfekta konfekcio  
fabrikita el plej  
altkvalitaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj  
konfekcibutikoj

### PRECIPAJ CENTROJ :

Antwerpen : Aalmoezenierstr. 2  
Anselmostr. 17  
Nationalestr. 87  
Leysstraat 10

Arlon : 12 Marché-aux-Légumes

Brugge : Breidelstr. 8

Brussel : Anspachlaan 194  
Oude Kleerkoperstr. 31

Gent : Brabantdam 21

Herstal : 4 Rue Large Voie

Leuven : Bondgenotenlaan 13

La Louvière : 16 rue Albert 1er

Luxembourg : 67 Place de la Gare

Mechelen : IJzeren Leen 32

Oostende : Kapelstraat 23

Roeselare : Ooststr. 124

Tournai : 75 Rue Royale

Turnhout : Herentalsstr. 6

Verviers : 2 Pont St. Laurent

Wetteren : Jos Buyssestr. 39-a